
# TEJO tutmonde!

numero 1.1983 januaro - februaro 1983



## La veraj proporcioj!

Tiu ĉi mondmapo prezentas la unuopajn teritoriojn laŭ iliaj faktaj grandecoj. Tiel la Nordo, do ĉefe Eŭropo kaj Usono, ne plu estas troige emfazitaj.

Kaŭzo estas, ke tiu ĉi mond-prezento de Peters ne malgrandigas regionojn, kiuj troviĝas ĉirkaŭ la ekvatoro.

Same kiel la tradiciaj mapoj diskriminacias la "Sudon", ankaŭ en la informiloj de TEJO ofte restis nur malmulta loko por Esperanto-junuloj el tiu regiono. Tio ŝanĝiĝu per tiu ĉi nova periodaĵo de TEJO!

## Jen, finfine, la nova revuo de TEJO

Ĝia alveno je via pordo esepereble ne estis surprizo por vi - alludoj al ĝia apero jam vidiĝis en pluraj revuoj de la Esperanto-movado.

Ankoraŭ unu nova revuo! Ĉu ni vere bezonas tion? Ni opinias ke jes. Junulara Esperanto-movado pli kaj pli venas el sia Eŭropa ŝelo kaj la bezono por tutmonda movad-uma (ne socipolitika, kiel Kontakto) revuo por junaj esperantistoj pli kaj pli sentiĝas. La eksperimento kun koncize montris ke artikoloj el tutmondo perfortas la karakteron de Eŭropa revuo, kia estas Koncize, kio estas nekontentiga afero kaj por la eŭropanoj kaj por la ekstereŭropanoj. Pro tio la Komitato decidis pri la fondo de TEJO tutmonde! (TT!) kaj la minimuma partopreno en regionaj revuoj.

Koncize, TEJO tutmonde! estas via revuo, vi el tutmondo. Estas via ilo por komuniki viajn ideojn pri la Esperanto-movado, raporti pri via agado al aliaj junaj esperantistoj. Viaj artikoloj, prefere kun fotoj aŭ aliaj ilustraj materialoj, estas bonvenaj ĉe la redaktoro.

La sekva demando: Kiaj artikoloj? kondukas nin al ekzameno de la enhavo de ĉi tiu numero. En nia ĉefartikolo nia ĝenerala sekretario klarigas kiel funkcias la gvidado de TEJO. Ĝin sekvas artikoloj rilatantaj la laboron de la komisionoj de TEJO kun interesa artikolo de nia eksestraro-ano de landa agado pri liaj esploroj en la varbpreferoj de la junulara Esperanto-movado en la ariergardo. Ĉi tiun parton do karakterizas artikoloj pri la agado kaj politiko de TEJO. En la dua parto, ĉi-foje iom magra pro manko de kontribuoj, estas la agadraportoj el la diversaj landoj de la mondo, kaj la kalendaro en kiu aperu junularaj renkontiĝoj (ĝis unu jaro post la aperdato de TEJO tutmonde!). Se vi planas junularan renkontiĝon, bonvolu informi nin pri ĝiaj datoj, loko, kosto kaj kie oni povas ricevi pliajn informojn. Eĉ se vi ankoraŭ ne konas precizajn detalojn, informu nin pri tiom kiom vi scias - ni povas aperigi pliajn detalojn en kalendaro de posta numero.

Mallonge pri la nova redaktoro: elektita estrarano pri landa agado de TEJO kaj redaktoro de TEJO Tutmonde! en aúgusto 1982, post unujara deĵoro kiel TEJO/KER-volontulo en la Centra Oficejo en Rotterdam, li estas prezidanto de Junularo Esperantista Kanada. Kiam li ne laboras por Esperanto li estas postdiploma studento pri germanistiko ĉe la Universitato de Waterloo en Ontario.

Ni ankaŭ havas teknikan redaktoron, Thomas Bormann, iniciatinto de TEJO Tutmonde!, redaktoro de la prov-numero pasintan majon kaj civilservanto en Hamburgo. Krome li ĉefrolas en la Hamburga Administra kaj Presa Servo (HAPS) de Germana Esperanto-Junularo.

Legu kaj ĝuu.

Paúlo

La Estraro de TEJO:

Prezidanto: Amri Wandel, Nordau 30a, IL-75263 Rishon Le-zion, Israelo

Ĝenerala Sekretario: Ian Tarrant, St John's College, Bramcote, Nottingham, Anglio NG9 3DS

Estrarano pri Kongresoj: Yves Bellefeuille, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario, Kanado K1H 8J4

Estrarano pri Eksteraj Rilatoj (KER): Martin Haase, Weidenpescher Str. 18, D-5000 Köln 60, FR Germ.


Estrarano pri Landa Agado: Paúlo S. Hopkins, 45 Mansion St., Kitchener, Ont., Kanado N2H 2J5

Estrarano pri financoj, eldonaĵoj kaj servoj: Ian Jackson, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave, London, Britio W11 4UF

Estrarano pri edukado de gvidantoj: Michael Lennartz, Theaterstr. 10, DDR-1720 Ludwigsfelde, Germ. DR

Estrarano pri scienca kaj faka agado: András Lukács, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

## KIU GVIDAS TEJOn?



Plej simpla respondo estus:"neniu!". TEJO ne estas organismo, kiel homo, kun cerbo kiu instrukcias al la korpopartoj kion ili faru. TEJO estas libervola asocio de unuopuloj kaj organizoj, kiuj estas pli-malpli liberaj fari kion ajn ili volas. La strukturo de TEJO kontribuas al internacia kunlaborado, al iom da kohereco en la agado, kaj al reciproka informado.

Rigardu la diagramon je la apuda paĝo. Ne timiĝu! Komencu ĉe "Asociaj Membroj en Landaj Sekcioj", kaj sekvu la liniojn al diversaj ag-organoj de la organizo. La praktiko estas pli simpla, ĉar plej ofte la homoj en la ag-organoj (redaktoroj, komisionoj ktp) troviĝas ankaŭ en la decidorganoj (Komitato, Estraro ktp).

### Senpovo de la Komitato

La supera decidorgano estas la Komitato. Ĝi kunvenas ĉiujare dum la IJK, kaj nun havas klaran proceduron por poŝtaj voĉdonoj, por ke komitatanoj el la tuta mondo povu partopreni en decidoj. Bedaŭrinde, tiuj Landaj Sekcioj kiuj ne ĝenas sin nomumi komitatanon, rezulte ne reprezentiĝas.

Tamen, oni memoru ke la Komitato estas relative senpova. Se ĝi decidas, ekzemple, eldoni lernolibron por eskimoj, la decido restas senefika, se neniu pretas verki, kontroligi, distribui ĝin - aŭ almenaŭ serĉi homojn por fari tiujn taskojn. Esence, la Komitato povas iniciati nur tiujn laborojn kiujn pretas fari ĝiaj anoj aŭ aliaj personoj.

### Kiel influi TEJOn?

La vera povo en TEJO estas je la komisionanoj: ili faras la laboron, kaj plejparte ili mem decidas kiamaniere fari ĝin. Estas facile partopreni: se vi volas, anoncu vin al iu komisionestro. Vi restos nek seninflua, nek senlabora!

Sed, eble interesas vin neniu el la komisionoj. Eble vi volas okupiĝi pri iu alia fako: kulturo, studentoj, lernolibro por eskimoj.... Do, proponu vin al la Estraro (aŭ Komitato) kiel Komisiito pri tiu fako. Se vi havas taŭgajn praktikajn ideojn, vi certe ricevos aprobon kaj subtenon (eventuale eĉ financan).


### Povo de la Komitato

La Komitato tamen havas plurajn funkciojn. Ĝi ebligas la esprimiĝon de kritikoj kaj novaj ideoj. Ĝi defendas la strukturon de TEJO kontraŭ la disintegriĝo kiun riskas ĉiu junulara organizo; sed ĝi ankaŭ havas la povon modifi tiun strukturon.

### Kiel aniĝi en la Komitato?

Nu, se vi vere volas, mi klarigos. Se vi loĝas en lando sen Landa Sekcio, aŭ se via Landa Sekcio ne nomumas vin komitatano, ekaktivu internacie kiel jam priskribite. Oni rimarkos vian laboron, kaj verŝajne elektos vin B-komitatano, aŭ eventuale estrarano. Sed atentu: oni tiam atendos de vi pli da laboro, ne nur pri via fako, sed ankaŭ pri aliaj aferoj!

Ian Tarrant
Ĝenerala Sekretario




——→ elekto/nomumo-povo — — — — forta dudirekta komunikado

## Komisiono pri Eksteraj Rilatoj

### Labortendaroj

En aprilo de 1982 la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO eldonis por la tria sinsekva jaro katalogon pri labortendaroj en kiuj Esperanto estas uzata aŭ instruata - kiel en la tendaro de "Muelejoj de Metilernantoj" en Bonnat (Francio) kie dum la pasinta somero juna jugoslaviano kondukis kurson por 15 lernantoj el 7 ŝtatoj.

La katalogo aperis en angla, franca, nederlanda kaj Esperanta lingvoj. Precipe la lastaj du versioj estis plej popularaj; la Esperanta versio estis represita en Koncize kaj la nederlanda en Jongeren Esperanto Nieuws (bulteno de la nederlanda kaj flandra landaj sekcioj de TEJO). Dum majo kaj junio petoj por la nederlanda katalogo venis telefone kaj skribe en la Centra Oficejo de TEJO preskaŭ ĉiutage.

Malgraŭ la sukceso sur la kampo de labortendaroj kaj spite al la reeldono de la lernolibro Ĉu vi parolas tendare? ankoraŭ ne ekzistas sufiĉe da tiaspecaj aranĝoj malfermaj ankaŭ por neesperantistoj aŭ komencantoj. Tia malfermo estas grava tasko ne nur por TEJO kaj ĝiaj landaj sekcioj sed por ĉiu esperantisto.

Pro tio ke junuloj komencas fari planojn por la somero jam en frua printempo, gravas ke informoj baldaŭ kolektiĝu por ke la katalogo povu aperi en marto. Do, pripensu la aferon kaj sendu planojn kaj informojn kiel eble plej baldaŭ, sed nepre antaŭ la 10-a de februaro, al la redaktoro de TEJO Tutmonde!.

### Volontuloj

La laboro de KER de TEJO, kun la multaj rilatoj kun diversaj gravaj asocioj, la konferencoj kaj la eldonaĵoj, preskaŭ postulas iun kiu povas dediĉi grandan parton de sia tempo al la laboro de KER. Tia homo ofte estas la volontulo laboranta por TEJO en la Centra Oficejo de UEA/TEJO en Rotterdam, Nederlando. Inter la komenco de septembro 1981 kaj la fino de aŭgusto 1982 tiu volontulo estis la nuna redaktoro de ĉi tiu revuo. De la mezo de septembro ĝis la mezo de oktobro okupis tiun postenon Alain Dawson kiu subite demisiis pro profesiaj kialoj. Nun ni ne havas volontulon, sed volas unu. Se vi interesiĝas helpi nin laborante en la Centra Oficejo deUEA/TEJO kontraŭ loĝigado, asekuro kaj poŝmono por manĝaĵoj, skribu al la direktoro de la Centra Oficejo de UEA/TEJO:

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

## Komisiono pri Landa Agado

### Al ĉiuj kiuj estus kontaktadreso de TEJO!

Okazas renoviĝo de la kontaktadresa reto de TEJO. Kontaktadreso estas juna individuo aŭ (prefere) junulara asocio en lando kiu ne jam estas landa sekcio de TEJO. Kontaktadreso reprezentas TEJOn en sia lando, informas pri TEJO kaj informas TEJOn pri sialanda agado. Reciproke tiu ricevas subtenon, kaj informan kaj alispecan, de TEJO. Jamaj kontaktadresoj kiuj ne kontaktis la estraranon pri landa agado dum la pasintaj kvar monatoj bonvolu tion nun fari. Ĉiuj kiuj pretas/deziras esti kontaktadresoj (kaj ankoraŭ ne estas) skribu al la estrarano pri landa agado menciante siajn aĝon kaj lastatempan agadon por Esperanto (por individuoj) respektive kiom da membroj vi havas, en kia teritorio loĝas ili, kiajn aĝojn havas ili kaj la nomojn kaj funkciojn de la estraranoj (por asocio).

### Kielmaniere plej efike informi pri Esperanto?

Por enketi pri la diversaj manieroj aŭ bezonoj informi pri Esperanto en diversaj landoj, mi en julio 1982 sendis cirkuleron al ĉiuj Landaj Sekcioj kaj kontaktadresoj de TEJO, al kelkaj Individuaj Membroj kaj aliaj aktivuloj loĝantoj en Afriko, Meza Azio kaj Suda Ameriko - entute al 65 adresoj.

Kvankam nur revenis 13 respondoj, la ricevitaj informoj kaj datoj donas interesan superrigardon pri la metodoj, laŭ kiuj junularaj grupoj informas aŭ deziras informi pri Esperanto.

En la sendita enketilo mi menciis ke en la informa agado oni povas akcenti la "idealisman" flankon de Esperanto ("La dua lingvo por ĉiuj") aŭ elstarigi la aplikeblecojn per Esperanto (vojaĝi eksterlanden, partopreni kongresojn). Jerley Sabogal Tamayo el Kolombio konsentas kun mi, ke ĉiu esperantisto estas "iomgrade idealisto kaj iomgrade aplikanto", kaj ke la aplik-eblecoj altgrade dependas de la vivkondiĉoj de la homoj: Ekzemple en la multetna Eŭropo pli facile eblas vojaĝi eksterlanden kaj renkonti alilingvanojn. Ke tiu problemo estas eĉ pli kompleksa, pruvas

la demando de Jerley el Kolombio: "Kion oni povus diri pri la belegaj idealoj de Esperanto, kiam la plimulto el niaj gejunuloj malfeliĉe ne povas atingi universitatan instruadon, (...) kiam ili ekonomie apenaŭ atingas vivadi?"

Ian Jackson (Junularo Esperantista Brita) kritikas la terminon "idealisto", ĉar ne estas klare difinebla la 'idealisma inform-agado'. Ian skribas:"En Britio ni ne fanfaronas pri la interna ideo, pri la personeco de Zamenhof, aŭ pri la revo al monda paco. Sed ni ja emfazas la pli praktikajn aspektojn de la zamenhofa koncepto: la facileco de la lingvo, la diskriminacio en la nuna lingva reĝimo, ktp.

Krome Ian klarigas la ĉefcelon de la informada politiko de la Esperanto-movado en Britio: "Krei etoson de informita opinio favore al Esperanto por subteni nian agadon ĉe publikaj instancoj", do iomete kontraŭe al la principo kiun sekvas 'Rondo Harmonia' el Japanio: "Ni povas sukcesi en Esperanto-movado nur per la plimultigo de esperantistoj konsciantaj pri la signifo de lingvo internacia kaj ĝia movado."

Por povi kompari kelkajn konkretajn rezultojn, mi en la enketilo starigis la jenan demandon:

"Imagu ke vi devus verki informilon/varbilon pri Esperanto. Bonvolu indiki, kiun prioritaton vi donus al la sekvantaj subtemoj. (La subtemo kun la plej alta prioritato ricevu la ciferon '1', tiu kun la plej malalta prioritato ricevu la ciferon '6'.)

A Esperanto estu la dua lingvo por ĉiu homo.

B Per Pasporta Servo eblas gasti senpage en eksterlando.

C Ekzistas ampleksa literaturo kaj gazetoj en Esperanto.

Ĉ Esperanto estas pli facile lernebla ol ĉiu alia lingvo.

D Okazas multaj renkontiĝoj pri plej diversaj temoj en Esperanto.

E Per Esperanto eblas korespondi kun la tuta mondo."

Por montri, kiom ofte al la unuopaj argumentoj estis donita la kioma prioritato, servas la ĉi-suba tabelo:

OFTECO DE PRIORITATO

| Prioritato: | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Argum. A | 2 | 5 | 0 | 2 | 1 | 3 |
| B | 3 | 1 | 1 | 3 | 1 | 4 |
| C | 0 | 1 | 6 | 3 | 2 | 1 |
| Ĉ | 5 | 3 | 2 | 1 | 2 | 0 |
| D | 3 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| E | 0 | 1 | 2 | 2 | 5 | 3 |

El tiu tabelo oni devas konkludi, ke ne eblas verki informilon kiu respondas ĉies bezonojn. Plej draste tio evidentiĝas en la argumentoj A kaj B. La respondintoj aŭ konsideras unu el tiuj frazoj ege grava kaj nepre enmetinda, aŭ ili opinias ĝin nur ete taŭga. Eĉ pli interesa estas, kion oni ne povas legi el la tabelo sed nur el la trastudo de ĉiu unuopa respondo: Ĝuste tiuj, kiuj donis al argumento A nur rangon 6 (Norvegio, Kanado, FR Germanio), metus argumenton B en tre altan (1 aŭ 2) prioritaton.

Plimulto de tiuj, kiuj donis al argumento A rangon 1 (aŭ 2), vidas argumenton Ĉ en rango 2 (aŭ 1): Brazilo, Britio, Japanio, Kolombio, Nederlandlingvio. Fakte argumento Ĉ laŭ tiu enketilo elstaras kiel nia plej uzenda slogano. Ĝin ankaŭ tiuj metis en relative fruan prioritaton, kiuj pli akcentis al aplikeblecojn de Esperanto.

Male al argumento A aŭ B, la argumento C laŭ preskaŭ ĉiuj estas mezgrava. Nur etaj minoritatoj trovas ĝin ekstreme grava aŭ ekstreme malgrava. Do eble ni devus klopodi, ke la Esperanto-literaturo kaj -eldonaĵoj estu pli vaste uzeblaj por doni al tiu argumento pli da pezo.

La rezultoj pri la argumentoj D kaj E kongruas kun la antaŭsupozoj: Landoj, kie eblas multe vojaĝi eksterlanden opinias argumenton D inter la plej gravaj (Ĉeĥio, FR Germanio, Jugoslavio, Slovakio, sed ankaŭ Kanado), dum pli izolitaj landoj (Brazilo, Japanio, Kolombio, Usono) donas al tiu argumento nur prioritaton 5 aŭ 6.

Logike ankaŭ, ke argumenton E taksas grava nur lando "tre izolita" kaj "ne tuŝita de fremdaj lingvoj" kia Nov-Zelando, de kie eblas apliki Esperanton nur per korespondado; des pli pro la fakto ke en Nov-Zelanda Esperanto-Asocio oni nur havas du junulojn loĝantaj sur diversaj insuloj.

Sed ne nur estas la tasko de TEJO studi la diferencojn de la prioritataj informmanieroj. TEJO ĉefe devas helpi kaj instigi en la informa agado de ĉiu unuopa lando. Por Jerley el Kolombio ne estas problemo varbi por Esperanto, ĉar liaj samlandanoj "ĉiam deziregas vojaĝi eksterlanden por labori aŭ studi". Plue li skribas: "Sed kio okazas kiam ili poste skribas eksterlanden por aliĝi al iu fakasocio, aŭ petas informojn de UEA kaj la skribintoj ne ricevas respondon? Kio okazas kiam la gelernantoj trovas ke ili estas nur izolitaj grupoj enlande?" - Pri tiuj prave akuzaj demandoj foje la 'mondaj funkciuloj' en Eŭropo devus mediti.

Sed komprenble tiuj eŭropanoj ne trudu siajn pensstrukturojn eksteren. Necesas konsciiĝo pri la specifaj bezonoj de la aliaj aktivuloj. Alikaze venas forta kritiko kiel tiu en la "Publika letero de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) al la Komitato de TEJO: "Dum la periodo 1978 ĝis julio 1981 TEJO simple rilatis kun BEJO surbaze de koloniisma konduto." Espereble tiu koloniismo vere finiĝis en julio 1981 kaj la "honestaj kaj konkretaj klopodoj de TEJO cele kunlabori pli firme kun siaj landaj sekcioj ekster Eŭropo" (citaĵo el publika letero de BEJO) transformiĝos al fruktodona interhelpo kaj aktiva kunlaborado.

Pro tiuj kaŭzoj preskaŭ ĉiu respondinto de la enketilo preferus mem verki informilon kaj la helpo flanke de TEJO limiĝu al kunorgigado kaj financa subteno. Nur grupoj kun ankoraŭ nur malgrandaj spertoj (ekz. Kolombio) petas TEJOn ankaŭ verki kaj produkti informilon por ili.

Resume, tiu enketilo el julio 1982 ne nur donis al ni multajn interesajn faktojn, sed ĉefe kelkajn konkretajn taskojn, kiuj atendas baldaŭan plenumon.

Thomas Bormann
Koppel 94
D-2000 Hamburg 1
FR Germanio

## Argentino

Kun granda sukceso okazis en Bonaero, de la 14-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1982 la 1-a Junulara Renkontiĝeto de ARGENTEJO. Partoprenis ĝin 20 gejunuloj alvenintaj el diversaj landopartoj kaj pola esperantista maristo, kies ŝipo hazarde ankriĝis en la Bonaera haveno ĝuste antaŭ la komenco de la Renkontiĝeto.

Aparte rimarkinda estis la "Soleneta Malfermo", en kiu la organizantoj kunfandis la solenecon kaj pompon kutime troveblajn en kongresaj inaŭguroj kun la malseriozeco propra al neformalaj junularaj kunvenoj. La rezulto estis speco de ŝipa baptoceremonio vojoinaŭgureska kun teatrecaj efektoj. Burleske imponan kadron liveris al la ceremonio bombasta muziko kaj mekanika fluganta kolombo. Post la malkaŝo de la unuafoje prezentata flago de ARGENTEJO, sur kiu oni fiksis tuketon entenantan la vicordon, urbon, kaj daton de la Renkontiĝeto, la gejunuloj prezentis sin. Post tio, la ĉeestantaj plenaĝuloj prelegetis pri la graveco de la evento. Bedaŭrinde, ĉar ne ĉiuj komprenas la karakteron de la junulara movado, aŭdiĝis tiam, el la buŝo de elstara esperantistino speciale invitita, sendistingaj kritikoj kontraŭ la junularo, kiuj iomete faligis la festan brilon.

La sekvinta programero konsistis en "Ekspedicio tra la Bonaera nokto". La organizantoj estis planintaj promeneton laŭ la urbocentro de Bonaero, sed la ĝenerala deziro viziti la ŝipon de la pola rekontiĝetano devojigis la "ekspediciantojn" kaj ilin kondukis tra mallumaj havenaj kvartaloj ĝis ili koliziis kontraŭ la firma malpermeso de la marpolico. Ĝi fakte estis vere laciga ekskurso, kiu finiĝis la dimanĉon frumatene en drinkejo per gaja tosto je la sano de ARGENTEJO.

Iom poste,je la dimanĉa tagmezo, la renkontiĝetanoj promenis tra la kvartalo, "La Boca", kiu estas pitoreska kvartalo de italaj enmigrintoj. Tie, sur strato nomata "Vojeto", la gejunuloj kantis la famkonatan tangon "Vojeto" en Esperanto. Kelkaj opinias ke ili "bojetis".

Revenintе al la renkontiĝetejo, la partoprenantoj estis torturitaj - kaŭze de eraro de la filmoliveranto - per longega mallongdaŭra filmo. Sekvis ne malpli longa divenludo kaj fine, premie al la sukcesintoj, oni regalis ilin per ekzotika frandaĵo el ĉokolado kaj fruktoj.

Lunde komenciĝis la laborkunvenoj. La partoprenantoj diskutis pri kelkaj aspektoj de la finorganizado de ARGENTEJO kaj aliaj temoj. Ili decidis i.a. komenci intensan varbkampanjon por Pasporta Servo de TEJO, starigi cir-

kulantan bibliotekon, daŭrigi la demarŝojn celantajn la eldonadon de komuna amerika revuo kaj okazigi la sekvontan renkontiĝeton en la urbo Puerto Rico (Provinco Misiones).

La lastan tagon, la renkontiĝetanoj denove kunvenis por redakti renkontiĝetan rezolucion kaj poste ĉiuj kune partoprenis "Ferman kaj Adiaŭan Tagmanĝon". Ne mankis, kompreneble, "postrenkontiĝeta ekskurseto" kaj do la renkontiĝetanoj povis finfine viziti la ŝipon de la pola maristo.

Osvaldo Pablo León

## Brazilo

BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) informas ke ĝi nun povas starigi komisionojn por prilabori la jenajn tre diversajn fakojn: informa, virina, muzika, sporta, fotoserva, poŝtmarkserva kaj korespondserva.

## Kanado

Okaze de la Monda Ĵamboreo de la Skoltoj julion 1983 en la okcidentkanada urbo Calgary (provinco Alberto) estos granda konkurso organizita de Skolta Esperanto-Ligo (SEL). El la partoprenantoj de la Ĵamboreo la 25 skoltoj aŭ skoltestroj kiuj plej bone kapablos paroli Esperanton ricevos po ducent kanadajn dolarojn (egalas proksimume 162 usonajn dolarojn). Ĉiuj esperantistoj estas petataj diskonigi ĉi tiun informon inter skoltoj.
Pliaj detaloj estas haveblaj de:
U.P. Ronald, 45 10th Ave., Roxboro, P.Que, Kanado H8Y 2N3.

## Koreio

Inter la 7-a kaj 11-a de aŭgusto 1982 okazis la unua komuna seminario inter la japanaj junularaj asocioj kaj Korea Esperanto-Junularo. La 48 partoprenantoj de la seminario ĉe la monto Sorak en Korea Respubliko atente aŭskultis diversajn prelegojn rilatantaj al la ĉeftemoj "Por kio ekzistas Esperanto?" kaj "Kio estas la plej bona instrumetodo por japanoj kaj koreanoj?". La seminarion, kies preparoj komencis antaŭ du jaroj dum la vizito de la prezidanto de TEJO, Amri Wandel, sekvos la dua meze de 1983 en Kameoka (Japanio) kaj oni esperas ke tradicio de ĉiujaraj komunaj seminarioj evoluos. Ĉi tia kunlaboro estas nepre imitinda de alilandaj junularoj.

## Kalendaro

JANUARO

26 - 30: Kvina Brazila Esperanto Junulara Kongreso en Iporá (Goiás); temo Esperanto-instruado kaj instruistoj, metodoj kaj praktikoj. Informo: BEJO, Caixa Postal 11-1110, BR-70084 Brasília (DF)

APRILO

1 - 4: Sepa Internacia Junulara Festivalo en Italio. Informo: Itala Esperanto-Junularo, p/a Norberto Saletti, C.P. 667, I-40100 Bologna Centro

4 - 9: Seminario de TEJO; temo: organizado de renkontiĝoj. Informo: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

8 - 13: Deka Studenta Interlingvistika Seminario en Warszawa, Pollando. Informo: PSEK, ul. Fredry 7, PL-60-967 Poznań

MAJO

20 - 23: Germana Esperanto-Kongreso en Bad Säckingen kun porjunulaj programeroj. Informo: GEJ, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1

JULIO

1 - 15: Internacia Infana Esperanto-Vilaĝo en Funka (Pollando). Informo: Esperantotur, Str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz

16 - 22: German-Franca Junulara Seminario en suda FR Germanio. Informo: GEJ, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1

AŬGUSTO

30 (julio) - 6: 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapest, Hungario. Informo: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.

---

## TEJO Tutmonde!

aperas 6 fojojn jare por ĉiuj Individuaj Membroj de TEJO, Landaj Sekcioj kaj kontaktadresoj. Ekde la venonta numero, nur tiuj ricevos ekzempleron de TEJO Tutmonde!, kiuj kotizis por la jaro 1983.

REDAKTAS: Paŭlo S. Hopkins, 45 Mansion St., Kitchener, Ont., Kanado N2H 2J5

ENPAĜIGAS, PRESAS, EKSPEDAS: Tobo & GEJ, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1